9e ANNÉE — N° 7 (87) — Juillet-Août 1933

# NORDA GAZETO

Bulletin mensuel de la FÉDÉRATION DES GROUPES ESPERANTISTES DU NORD DE LA FRANCE
( NORD, PAS-DE-CALAIS, SOMME )

RÉDACTION ET ADMINISTRATION
Gérant : Paul BENOIT,
2, Avenue G. Malo, **Malo-les-Bains** (Nord)
Chèque Postal 45745 Lille

Abonnement annuel **3** fr. — Eksterlande **7** fr. fr.
Pour la Belgique : 7 fr. belges.
Adresse : Grand Hôtel, Oostduinkerke
Chèque postal : 54574 Bruxelles

# Esperanta Tago en Saint-Omer
## 20an de Aŭgusto 1933

# Bela Sukceso
— de la —
# Federacia Kongreso en Dunkerque

———

La gasto, kiu sidiĝas ĉe bone aranĝita tablo kaj frande ĝuas lerte preparitajn manĝaĵojn, ne ĉiam komprenas la klopodojn kiujn necesigis la konstatata rezulto. Same la kongresano, kiu alvenas en la elektitan urbon kaj trovas ke ĝio estis utiligita por havigi al li facilan kaj agrablan restadon, ofte ne taksas laŭ ĝusta valoro la preparajn laborojn, kiuj malgraŭ kelkaj pli aŭ malpli sukcesigitaj detaloj fine kondukas tamen al bela prospero.

Ni ŝuldas do komplimentu, laŭ merito, la organizintojn de la Federacia Kongreso de 1933, la sindoneman sekretarion de la Dunkerque-a grupo kaj la membrojn de la komitato, kiuj igis nian regionan kunvenon sensimila sukceso, tia, kian certe dezirus multaj aliaj kongresoj. Estas vere, ke ili pensis pri tio de longaj monatoj, ekscitis la energiojn, skuis la ŝancelantojn, efektivigis valorajn protekton, revivigis la senvoliĝojn kaj disspasis alternajn esperojn kaj senkuraĝiĝojn. Ĉi tiujn tre mallongajn, ni ŝuldas en tiuj laŭdoj la membrojn de la Dunkerque-a grupo, kiuj ilin helpis en la peniga tasko. Kiel ĉiam la laboro de la lastaj tagoj estis la plej malfacila. Sed la organizintoj rajtas fieri pro la atingita rezultato.

Detalan raporton pri la okazaĵoj de la kongreso ni ne povas fari tie ĉi : tio ja necesigus duoblan numeron de nia jurnalo. La loka kaj regiona gazetaro, kaj speciale « Le Nord Maritime » publikigis longajn artikolojn pri niaj kunvenoj, kaj pro tio ni ilin sincere dankas. Ili elpruvis, ke la demando pri internacia lingvo estas serioza temo, kiu indas atentigi ĉiujn ; kaj ilia helpo estos al ni valora por la estonta propagando.

La programo estis abunda ; ni notu tuj, ke ne okazis iama malfruiĝo aŭ prokrasto. La unuaj vizitantoj, el Nederlando alvenis vendredon vespere kaj tio estis bonega preludo por la Dunkerque-anoj kiuj ilin akompanis. La angla karavano elŝipiĝis la sabaton matene : en ĝi ni plezure revidis Sinon Ongley kaj Sron Nash. Sub gvidado de Sro Degand, vicprezidanto de la grupo, tiuj unuealvenintoj vizitis la urbon kaj ĝiajn vidindaĵojn.

La laborado de la kongreso efektive komenciĝis je la 13.30 per la ekzamenkunsido : Atesto pri lernado kaj atesto pri kapableco. La alsvarmo de la kandidatoj superis la antaŭkalkulojn : la ejoj, kiujn disponis la Komitato en Paul Bert-lernejo, fariĝis nesufiĉaj. Vidiĝis tiam ekzameniĝantoj kiuj skribis sur la angulo de la kameno,sur la fenestrobretoj:tio ja estis originala, sed ankaŭ ne ĝenis la bonkvaliton de la taskoj : pri tio oni juĝos, legante la oficialajn rezultatojn, kiujn ni aperigas sube, kaj oni eĉ konstatos, ke kelkaj kandidatoj povis fari eĉ ambaŭ provtaskojn. SSroj Deligny, Perrin, Homez kaj Benoit, juĝantoj, diligente ekzamenis ; sed je la fiksita horo, la sekretario anoncis la foriron al la vizito de la haveno, kaj deklaris ke la parola ekzameno okazos ĝuste la vesperon dum la balo. La prezidanto de la juĝantaro ne estis tiel kruela (la afero interesis precipe junulojn) kaj ĉion oni aranĝis kiel eble plej bone. En la sama lernejo, je la sama horo, Fino Saxl, helpatan de Sro Degand, sekvis juĝantaro de kvindek diverslandaj konkursontoj, kiujn logis la belaj premioj ; post promenado en la koridoroj, ili fine trovis malplenan ĉambron, kie ili vigle laboris.

Vizito de la haveno okazis per trenŝipo, kiun bonvole disponigis la Komerca ĉambro, kaj sub gvidado de Sro ĉefinĝeniero Broquaire,kies detalaj klarigoj tre interesis la pli ol cent partoprenantojn.

Apenaŭ elŝipiĝinte, la kongresanoj iris la Turisman Domon, kie atendis ilin varma akcepto patronata de la Dunkerque-a Biciklo kaj Aŭtomobilo-Klubo. Ilin prezentis Sro Degand ; en sia parolado, Sro Hocquet rekonis la gravecon de Esperanto por faciligi la turisman interrilaton. Honora portovino laŭgis kiel aperitivo : oni ne havus ja tempon por trinketadi duan,

ĉar jam sonoris image la voko al vespermanĝo. Kiel en la fama rakonto de « Cid », la nombro de la batalantoj kreskis, minuto post minuto kaj 150 gastoj sidiĝis ĉirkaŭ la tabloj por apetite manĝi laŭ la bonega menuo, kiun preparis la restoracio Trassaert. La komitato tiel kunmiksis la kartojn, ke la najbareco estis tute ne antaŭvidita ; nenia malfacilajo, ĉar la ĝojo atingis ĉie tiuman altan tonon.

Sro Ch. Valentin, urbestro de Dunkerque, prezidis tiun belan kunvenon; Sro ĉefinĝeniero Broquaire, havenestro, Sro Laloux, prezidanto de la Iniciatava Sindikato kaj aliaj dunkerque-aj eminentuloj bonvole akceptis la inviton de la komitato. Ĉe la deserto ekparolis Sro Degand, esperante kaj france, kaj diligente pruvis la utilecon de la internacia lingvo;Sro Broquaire rakontis pri la kongresoj, kiujn oni nomas internaciaj, sed en kiuj oni ne interkompreniĝas ; Sro Laloux diris sian simpation al Esperanto. Fine Sro urbestro de Dunkerque ĉarmadis la ĉeestantojn per sia elokventa kaj sprita parolado ; li deklaris ke, dubinte pri la valoro de la helplingvo, li ekkredas je ĝi kaj eble baldaŭ troviĝos inter la fervoraj adeptoj : vere tondraj aplaŭdoj sekvis lian konkludon.

Tiu tago, jam bone plena, estis tro mallonga laŭ la plaĉo de la kongresanoj, kiuj poste vidis la filmon pri Kolonjo. Fine ili kunvenis en la salono Georges, ĉeestante tion,kion oni nomas laŭvorte vesperfeston, sed kio estis efektive noktofesto. Ni ne estu kruelaj kaj ni ne nomu tiujn, kiuj rehejmiĝis tromalfrue — aŭ tre frue. —

Dimanĉon matene, je la 8a, kongresanoj ĉeestis la diservon en la kapelo, strato David d'Angers, dum kiu R. P. De Coene, el Mons, faris esperante altspiritan predikon.

Aŭtoĉaroj vizitigis denove la havenon, kaj je la 10.30, pli ol 300 personoj ĉeestis la Generalan kunvenon de la Federacio, en la granda salono de la Urbodomo de Dunkerque. Prezidis Sro Deligny, ĉirkaŭata de Sino Sergeant kaj Fino Barret, vicprezidantinoj de la Federacio, Dro Vanverts, reprezentanta la Rektoron de la Lille-a Akademio, Sro Petit, konstanta sekretario de la S.F.P.E., Sroj Benoît kaj Houzé. En tre aplaŭdata alparolado, la Prezidanto montris la prosperon de la Federacio; li atentigis pri la Esperanto Tago en St-Omer, la 20an venontan de Aŭgusto kaj pri la Universala Kongreso en Kolonjo, kaj li dankis la ĉeestantojn pro ilia fervora diligenteco.

Sro Centnerŝver, provizora sekretario, legis tre detalan kaj interesplenan raporton pri la agado de la grupoj dum pasinta vintro : la plej bonajn rezultatojn laŭdis aplaŭdoj.

Sro Payen, kasisto, aprobigis la kalkulojn de la jaro kaj montris la kontentindan staton de la Federacia kaso.

Diversajn proponojn oni diskutis, inter aliaj pri organizo de rondiranta biblioteko, pri paroladistoj sendotaj en la grupojn, pri rekomenco de la koresponda kaj radia federaciaj kursoj pri kunveno de la Federacia komitato ĉiun trian monaton. Sro Houzé proponis, ke oni daŭrigu la studadon de tiuj demandoj per « Norda Gazeto » kaj cirkuleroj al la grupoj.

La kunsidantaro aprobis la proponojn de Sro Benoît, en la nomo de la grupo, pri sendo de gratuloj kaj dankoj al la institucioj, urbestraroj,iniciativaj sindikatoj, komercaj ĉambroj, radiostacioj, kiuj nin helpas kaj subtenas nian movadon. Tio estos la tasko de la sekretario.

Sro Perrin faris kelkajn rimarkojn pri propagando kaj Sro Petit parolis pri la agado de la S. F. P. E., montrante la novajn turismajn organizajojn.

La estraron oni reelektis aklame. Ĝi estas : Sro Deligny, Prezidanto ; Sino Sergeant, Finoj Desmarets kaj Barret, vic-prezidantinoj ; Sroj Centnerŝver, sekretario, Payen, helpsekretario ; Humez, kasisto ; Benoît, delegito ĉe S.F.P.E., Houzé, delegito pri radio ; Hulin, Piette, Brunet, konstantaj membroj.

Neniu grupo prezentiĝis por organizi la 1934 an kongreson ; la ĉeestantaro decidis principe ĝin komisii al la grupo en St-Omer ; Sro Deligny konsentis kun rezervo.

La programo elĉerpite, oni fermis la kunsidon. Kelkajn minutojn poste, la kongresanojn akceptis oficiale Sro urbestro de Dunkerque en la salonoj de la la etaĝo de la Urbdomo. Sro Benoît ilin prezentis, rimarkigis ke ilin jam ĉarmis li la hieraŭon, kaj dankis lin pro lia favora bonsento. Sro Valentin denove tre afable parolis, certigis, ke lin trafis la esperanta graco, ke li ne kontentiĝos per tiu mallonga okazajo kaj promesis, ke li tute fervore protektos la esperantistojn por ilia propagando.

Oni tostis je la prospero de la Federacio kaj de Esperanto. Kaj aŭtobuse, trame aŭ piede, 250 kongresanoj rapidis al Malo, kie la festeno, prezidata de Sro urbestro de Malo, estis finonta tiun bela kunvenon.

250 gastoj invadis la salonegon de la Kazino. Ĉe la honortablo sidis, ĉirkaŭ sro urbestro Schipman, Sro Vanraet, vicurbestro kaj distriktokonsilanto, Sro Maeckereel, vicurbestro, Sro Leynaert, prezidanto de la Iniciativa Sindikato, Sro Delattre, fakestro de la haveno, ktp. Oni ne sufiĉe priskribas, dirante ke la manĝado estis tre gaja. Entuziasmo denove pli grandiĝis kiam, ĉe la deserto, sro urbestro sciigis, ke oni limigos la nombron de la paroladoj. Efektive kio plu estis dirinda kaj jam ne dirita ? Sro Benoît dankis Sron urbestron pro la forlaso de absorbaj okupadoj kaj la eksido inter la kongresanojn. La ĝojo kaj la kontentiĝo estas legeblaj sur ĉiuj vizaĝoj kaj esprimas la dankemon de la kunvenantoj, li diris. Poste li dankis, en Esperanto, la kongresanojn pro ilia veno multnombre, malgraŭ la malfacila epoko, gratulis ilin pro la laboroj faritaj kaj instigis ilin fieri, nomiĝante esperantistoj. Kiel konkludo ĉiuj stariĝis kaj kantis la himnon « la Espero » honore al la memoro de Dro Zamenhof.

Fino Saxl parolis en la nomo de la Internacia Ĉe-Instituto ; Fino Simoniz transdonis la saluton de la eksterlandaj samideanoj, kaj speciale de la Nederlanda teritorio de U. E. A.

Fine sro urbestro Schipman, en spritoplena improvizajo, salutis la kongresanojn. Li asertis, ke li estas feliĉa inter ili kaj ke li bone komprenas la gravecon de ilia movado. Kiel la urbestro de Dunkerque, li faris bonan surprizon al la aŭdantoj, legante paroladeton en Esperanto : li petis, ke baldaŭ la banloko fariĝos la rendevuo de la Esperantistoj. Taktaplaŭdoj vigle salutis la paroladon, kaj unu el la aŭdantoj eĉ ekkriis : « li ja povoscias Esperanton de dek jaroj ! »

La lasta okazajo estis la disdono de la premioj al la laŭreatoj de la hieraŭaj konkursoj, kaj venis la disiĝo. Sed ne estis jam la malkuniĝo, ĉar dum la tuta posttagmezo renkontiĝis aretoj kiuj babilis, fotografis, vizitis la luksan kazinon, kaj rendevuon donis ĝis venonta jaro.

La familia festo jam finiĝis, sed ĝi restos en ĉiuj koroj, kiel nemortebla memorajo. Ĝi kuraĝigis ĉiujn partoprenantojn por la estonta propagando. Tio estas bela rezultato.

## Dans la Fédération

### ANZIN

La ĝenerala kunveno de la grupo okazis la 15an de julio. S-ro Lenglé,

prezidanto, malfermis la kunvenon, kiun ĉeestis 20 membroj.

S-ro Centnerŝver faris la raporton pri la kongreso en Dunkerque. Aŭdante la raporton, la nepartoprenintoj al la kongreso, tiel entuziasmiĝis, ke ili promesis aliĝi la venonton kongreson, en St-Omer. Poste, laŭ propono de S-ro Payen, sekretario, estas akceptita plilarĝigo de la komitato. La novaj komitatanoj estas : S-roj : Léchelle (helpsekretario) Brzozowski, Langand, Cattelain, Romanik. Laŭ la propono de S-ro Dorchies, la grupanoj decidis kunveni ĉiusabate, je la 7a 1/2 vespere, en « Salon des Sports ». Dum la semajnaj kunvenoj la supera kurso daŭrigos. Por la certa efektiviĝo de la grupprojektoj, oni starigis diversajn monpunojn, akceptitajn de ĉiuj grupanoj. Poste, oni prilaboris diversajn projektojn por la oktobraj kursoj.

Depost ĉi tiu kunveno, la semajnaj rendevuoj estas kontentege vizititaj. Ĉiu grupano aparte propagandas kaj ni havas la plej grandajn esperojn por la oktobraj kursoj.

.˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙

## FOURMIES

Organizi CSEH-KURSON en malgranda urbo kiel Fourmies (1400 an) kaj kunigi 88 lernantojn, ĉu estas miraklo ?

Absolute ne !

« Voli estas povi » oni diras.

Ĉar li volis, modesta esperantisto el Fourmies - Sro Hulin - povis.

Kiel li tiel bone sukcesis ?

Antaŭe, li malfermis kurson kiun li men gvidis dum du monatoj. Dank'al sia sindoneco kaj fervoro, li plenakiris la simpation de siaj gelernantoj kiuj fariĝis propagandantoj. (Senpera propagando estas la plej efika).

Dum la monato kiu antaŭis la malfermon de la kurso, la fervoraj arangantoj tute sindonis : invitoj, propagandiloj voĉanoncoj, afiŝoj pluvis sur la malgrandan urbon.

La provleciono okazis la 29an de majo, antaŭ ĉ 250 aŭskultantoj. Inter la pluraj gravuloj, menciinde la urbestro, Sro Deligny Konsilanto por la « norda departemento ». La direktoro de la komerca kaj industria lernejo Sro Pierron.

Dro Vanverts Profesoro ĉe la medicina Fakultato de Lille membro de la Akademio de medeçino prezidis dum la provleciono kaj tradukis.

La profesorino, Fino Saxl, kies ... talento estas bonkonata faris ...vinkajn paroladon kaj lecionon. Je ... unua vespero, 46 personoj aliĝis. Tiu nombro kreskis dum la sekvantaj tagoj kiel ĉi sube : 70-83-87-88. Tiu progreso ne mirigos la esperantistojn kiuj jam ĉestis Cseh-Kurson ĝi malpli mirigos la lernintojn de Fino Saxl, ĉar ili konas ŝian pedagogian lertecon.

La entuziasmo tiel kaptis la lernantojn ke ili decidis fondi grupon. Ili festis la grupnaskiĝon per multaj ĝojfestoj : paroladoj, ŝercoj, kantoj, dancoj. « Maurice » la plej juna el la lernantoj : 11jara, kaj Sino Baraud, kortuŝe adiaŭis F-inon Saxl. En la nomo de siaj geamikoj, la kursaranganto - Sro Hulin - dediĉis belan dikan pedagogian krajonon al la Profesorino kiu krom tio ricevis multajn valorajn donacojn.

En ĝojo, en fervoro naskiĝis nia Grupo, ĝi vivos ĝi kreskos, ĝi estu ekzemplo kiun sekvos multaj naskiĝontaj grupoj.

.˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙

## AMIENS

Fino Desmarets, prezidantino, estas grave malsana ; ni ĉiuj esperas, ke ŝi baldaŭ resaniĝos.

Korespondajojn oni sendu al Sro Gambart, 13, rue Le Nôtre, Vic-Prezidanto.

.˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙

## ARRAS

La ĉiusemajnaj kunvenoj estas bone vizitataj : la ĉeestantoj energie laboras per **Fundamenta Krestom**atio kaj Grammaire Complète d'Aymonier.

Kelkaj preparas la **Ateston pri Kapableco.**

.˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙

## BOULOGNE

Laŭ la raporto legita en la Federacia Kongreso, 120 gelernantoj estas pretaj por **Atesto pri lernado.**

Okaze de la Tutmonda Kongreso de la Skoltoj en Godollo (Hungarujo) la grupo propagandis ĉe la skoltoj kaj sukcesis interesigi kaj instrui kelkajn.

La Gazeto « La Croix du Pas-de-Calais » publikigis la 30an de Julio Esperantistan kronikon.

Dankon al tiu plia gazeto, kiu subtenas nian movadon.

**Lens, Avion, Liévin, Hénin-Liétard, Billy-Montigny.**

M. Brunet, Secrétaire du groupe d'Arras, 7, rue St-Michel, travaille énergiquement à la constitution de nouveaux groupes avec l'aide des isolés de ces localités et plus particulièrement à Lens, où un cours est prévu pour Octobre.

## DUNKERQUE-MALO

L'assemblée générale du groupe a eu lieu le 20 Juillet au restaurant Trassaert. Une cinquantaine de membres y assistaient. D'importantes questions y ont été traitées et les statuts mis au point. Le nouveau comité comprend 16 membres qui a réélu le même bureau qu'en 1932-1933.

Les rapports moraux et financiers révèlent une situation en net progrès dû à l'esprit de camaraderie et de collaboration de la quasi unanimité des sociétaires.

Ses grupanoj partoprenas la Universalan Kongreson en Kolonjo. En la monata kunveno, la 3an de Aŭgusto partoprenis 35 personoj. **Jens Schjerve** ĝin vizitis kaj faris interesegan paroladon pri vojaĝo al Spitzberg de la Ŝipo Foucault.

Nia jara ekskurso okazos la 20an de Aŭgusto al St-Omer. Nia Festokomitato preparis tre allogan programon, eble dua aŭtoĉaro estos necesa.

.˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙ .˙

## SAINT-OMER

La Grupo vigle preparas la **Esperantistan Tagon,** kiu okazos la 20an de Aŭgusot. Multaj samideanoj jam sin anoncis ; bonvolu la malfruantoj sendi sian aliĝon kiel eble plej frue.

## FOTOGRAFAJO

Tiuj, kiuj deziras ricevi la oficialan fotografajon (antaŭ la urbdomo de Dunkerque) sendu 5 frankojn 1/2 al Sro Jean Hendrikxen, 45, rue Emmery, Dunkerque.

Se vi deziras respondon, sendu afrankitan koverton kun via adreso.

## EKZAMENOJ

13 sukcesis la **Ateston pri Kapableco** ili sendu 12 frankojn al Sro Houzé, B. P. 192, Dunkerque, ĉekkonto Lille, 450059 por ricevi la displomon.

17 sukcesis la **Atesto pri lernado.**

**Ad. LACROIX & Cie**

***VÊTEMENTS***

**BOULOGNE-SUR-MER**

**5, Grande-Rue 5,**

Télép. 1.03

**Mêmes Maisons :** Calais, Dunkerque, St-Omer, Metz, Abbeville, Le Havre, Douai, Lille, Cambrai, Le Cateau, Amiens, St-Quentin, Valenciennes, Maubeuge, Lens, Roubaix, etc.

**Hôtel Moderne**

*Marcel BRAY, Propriétaire*

Tout confort — Prix modérés

58, rue Amiral Bruix
et 8, rue Faidherbe

BOULOGNE-SUR-MER
Télep. 3.69

*Oni parolas Esperante.*

TOUT POUR L'AUTO

**GOURNAY Frères**

90-92, rue de la Scierie
BOULOGNE-S/-MER
Tél. 4.31

MECANIQUE - CARROSSERIE
PEINTURE
— Devis gratuits —

***HOTEL***

*Brasserie Liégeoise*

***Restaurant***

8, rue Monsigny 8,
BOULOGNE-S/-MER

**Paul MARMIN, Propriétaire**
Télep. 0.99

**HOTEL MEURICE**

RESTAURANT

Prix fixe et à la carte

*35, Rue Victor Hugo, 35*

**Boulogne-sur-Mer**
Télep. 1.07

Les Emissions espérantistes
de tous les postes Européens
sont reçues avec fidélité
avec le récepteur
ULTRA SÉLECTANCE

**ONDIA**

— 101 stations repérées —

**ONDIA**, 2, rue de Paris
Boulogne-s/Mer Tél. 16.44

LE MANTEAU
LA FOURRURE
LA ROBE
LE CHAPEAU

**Le "grand chic"**

3, rue Thiers, 3,
BOULOGNE-SUR-MER
Tél. 2.59 R. C. B. 5912
S. DARDIK
Tout pour l'élégance de la Femme
— — et de la Fillette — —

LIQUEURS TROGNEUX
Impérial old Port
VINS-SPIRITUEUX
GROS & DETAIL

***C. BOULAN***

93, Rue Faidherbe, 93
BOULOGNE-S/MER Télep. 2.30

*Oni korespondas Esperante.*

UN RÉCEPTEUR DE QUALITÉ
EST TOUJOURS SIGNÉ

"LA VOIX DU MONDE"
DUCRETET

Agent Régional :

**CARLIER**

7, rue du Vieux Rempart
DUNKERQUE
Tél 1516

**MAISON SADYN**

3 et 5, rue du Lion d'Or
4 et 8, place du Palais de Justice
DUNKERQUE
Outillage - Fers - Métaux
Ménage - Chauffage
Article de Bâtiments
Le plus grand assortiment
Les plus bas prix
Tél. 729

COUTELLERIE

ORFÈVRERIE

**PETYT FRÈRES & Cie**

*Boulogne-sur-Mer*
Télep. 0.54

**VINS**

**MILLON**

Maison fondée en 1696
par **A. MILLON**
BOULOGNE-SUR-MER
Télep. 3.86

*Oni korespondas Esperante.*

Saint-Omer. — IMPRIMERIE de L'Indépendant du Pas-de-Calais